

2x

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO


Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 3

Majo / Junio / Julio 1975



Eksprestrajno sur la Tauern-linio

La afabla kongreso

La 27a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio pasintan Majon kunigis en Villach 675 partoprenantojn el 20 landoj kaj tri kontinentoj, inter tiuj 111 kongresanoj el GEFA teritorio. Unu semajnon alternis fervojfakaj kunvenoj, organizaj kunsidoj, folkloraj prezentoj, instruaj ekskursoj kaj festaj eventoj.

La fervojistaj esperantistoj konscias pri la grava rolo de sia faka organizaĵo en la movado kaj atendas pli vastan agnoskadon de la Internacia Lingvo flanke de fervojaj administracioj, sindikataj grupoj, politikaj partioj kaj ŝtataj instancoj, kion resume ankaŭ esprimas la kongresa rezolucio.

Jam ek de la akcepto aŭstria ĉarmo kaj serena vetero kreis afablan etoson. La kongresano, kiu volis ne nur turisme ekspluati la konvenan situon de Villach, tiu trovis bukedon da okazoj, profiti la internaciecan medion. En- kaj eksterprograme la kongreso prezentis variajn eblojn por praktiki lingvajn kaj fakajn sciojn en prelegoj, diskutoj kaj konversacio. Bonan frekventadon notis eĉ kelkaj laborkunsidoj de la IFEF-institucioj, kies modelan, demokratian funkcion oni povas ne tro ofte akcenti, konsiderante aliajn internaciajn kunvenojn, inkluzive fakajn aŭ politikajn, kaj ties rezultojn.

Sed multaj faktoroj kontribuas al sukcesa kongreso. Kvankam la programo okazas ĉiujare laŭ rigida skemo, provita kaj aprobita, valoras tamen kronologie raportoj pri ĝiaj detaloj kaj amike kritiki ĝin el la subjektiva perspektivo de ne-nur-observanto, por informi neĉeestintojn, memori partoprenintojn kaj eble doni sugestojn al ĉiaj estontaj organizantoj.

Sabaton, la 10an

Pli ol ĝentila gesto: LKK-anoj en la stacio Villach salutas la alvenantojn, specialaj aŭtobusetoj atendas antaŭ la stacidomo por veturigi la gastojn al la hoteloj. Kora bonvenigo en la akceptejo de la kongresdomo: evidente streĉitaj deĵorantoj, tamen afable servopretaj, sukcesas prizorgi glate kaj rapide la tuttage individue kaj grupe aperantajn kongresemulojn. La kongresejo, lokigita super la riverbordo de Draŭ, konsistas el interne tre variebla betonkubo apud la flore kaj flage ornamita Eŭropa-Placo; la ĉefe volonte demonstras al interesiĝanto kelkdekon da artifikoj: sorĉi salonegojn el kunsidoj, aperigi scenejojn kaj

danclokojn, direkti lumludojn k. a. „Guste taŭga, li diras, por tia malgranda kongresurbo.“ Guste taŭga ankaŭ por gastigi nian variprograman kongreson dum unu tuta semajno. Cetere, nur antaŭ tri jaroj inaŭguris ĝin la estimata aŭstria federacia prezidento Franz Jonas.

Plej multaj hoteloj kaj gastejoj situas nur minutojn for de la kongresejo, kio faris la kunvenojn pli intimaj kaj akurataj, kaj la paŭzojn pli komfortaj ankaŭ por la kunlaborantoj kaj funkciuloj.

Vespere unuan fojon sin prezentis Kvarteto Esperanto el Trenĉin ĈSSR. Modera kaj por ĉiu aĝo konvena danmuziko donis decan kulison kaj stimulan fonon por la Interkona Vespere, dum kiu eĉ eblis ankoraŭ konversacio.

Dimanĉon, la 11an

Laŭ Kongresa Bulteno 400 kongresanoj en S. Nikolai ĉeestis la meson, kiun kuncelebris patro Ciccanti el Rimini kaj kanoniko Hochgatterer el Aŭstrio. Regionaj gazetoj dediĉis grandan atenton ĝuste al tiu ĉi evento. Patro Ciccanti ŝajnis malpli optimisma koncerne la taksitan nombron.

La Solena Malfermo venigis la plej multajn kongresanojn al la feste dekorita, agrable klimatizita salonego. Per freŝaj melodioj Fervojista Orkestro Arnoldstein komencis la solenaĵon. Dekoj da parolantoj diris siajn salutojn, kuraĝigojn kaj aprezojn. Sinjoro G. Gilles, bone konata inter ni kiel reprezentanto de FISAIK, akcentis la komuncelajn klopodojn. La direkcia prezidanto de Villach, dipl. inĝ. Bachler, kies distrikto limas al Hungario, Slovenio kaj Italio konstatis, ke el lia personaro apenaŭ iu kapablas praktiki pli ol unu koncernen fremdlingvon; dezirinda estus la Internacia Lingvo por ĉiuj kvar landoj. Ĉefurbestro inĝ. Resch memorigis, ke Villach de 1921 estas tradicia esperantista urbo, kaj jam de 1963 havas Esperanto-straton. La vic-landestro de Karintio, s-ro Frübauer, rimarkis, ke Esperanto estas vivanta lingvo, kaj postulis ĝian enkondukon en ĉiujn lernejojn. Inter la reprezentantoj de la landaj asocioj vicprezidanto W. Graß transdonis la salutojn de GEFA, BSW kaj sindikatoj.

En nia maltrankvila mondo, malpaco, ekonomia necerteco, ekologia malekilibro, monavido kaj amuziĝemo elradias influojn malsanigajn al korpo kaj menso, diris

IFEF-prezidanto Gießner en sia inaŭgura prelego. Ni konscie klopodu pri alternativo, por ne droni en kirlo de malordo, inerto, malamo; la Internacia Lingvo kiel etika tasko ne estas tute nova aspekto. Li energie substrekis ankaŭ la gravecon de la pure faka laboro en niaj kongresoj. Ne ekzistas dubo pri la rekta vojo de nia federacio, kun unu sola escepto: ne neŭtrala estas nia lingva koncepto.

Pli funebra ol solena premis la sentimenton tiuj iom mistaktaj tri strofoj (komprenelbe sen kanto) de la himno, kvazaŭ sondisko kun duona turnrapido; la tekston bonvolu trovi sur paĝo 3 de la kongreslibro.

La posttagmezon pluraj aŭtobusoj veturigis la kongresanojn tra la Villach-alpo sur la ĉeurban monton „Dobratsch“, de bolvarma valkaldrono al grizneĝa vintro. La seĝlifto ne emis transporti, kaj sur la molaj deklivoj glitadis somere ŝuitaj grimpantoj trans rokaĵon kaj torentetojn da neĝakvo. Naturamikoj trovis la unuajn siringokolorajn alpoŝlorojn kaj ĝuis la belan panoramon sub rapide ŝanĝiĝanta ĉielo. Aliaj akiris pendostarlakon ĉe brando kaj grogo en la sola surmonta trinkejo. En la malsurpren veturantaj aŭtobusoj la konversacio estis grandojn pli laŭta.

Karintia muziko vespere kondukis la spektantojn en la folkloran medion de la regiono. Kantoj kamparanj kaj dancoj el diversaj valregionoj kompletigis la bildon pri iamaj moroj, metilaboroj kaj vivado en la kongreslando. La kulmino de la vespero tamen estis alspeca. Du merito-plenajn anojn de IFEF la prezidanto povis nomumi honoraj membroj: k-gon K. G. J. de Jong kiel iman prezidanton kaj k-gon Otto Walder kiel ekskasiston. El la mano de FISAIC-vicprezidanto Gilles nia sekretariino Elfriede Kruse ricevis la oran medalon de FISAIC, kiel agnoskon de ŝia sennombraj aktivaj en la movado, speciale en IFEF, por nia idealo, la interpopola kompreniĝo.

Lundon, la 12an

La unua labortago prezentis al prezidantaro, komitato kaj komisionoj plenan tagoron, pri kio oni legos la oficialajn raportojn en IF.

La fakprelega komisiono, pelita de malfruinta komitatkunsido kaj de tagmeza horo, kunvenis en nekutime malgranda rondo. Oni diskutis problemojn pri kompilado, revizio, organizo kaj

prezentado de fakprelegoj. Generalaj gvidlinioj estas nun redaktitaj. La kunvenintoj bedaŭris, ke la faka karaktero de la 27a kongreso ne sufiĉe forte akcentiĝis, ekzemple per pli vasta aprezo aŭ fakprelega resumo en la kongreslibro, kiu cetere havis sufiĉe da malplena spaco. En la kadro de la Universala Kongreso danaj kolegoj ĉi-jare okazigos fakprelegon pri pecajotransporto kaj fakan ekskurson.

Dum la fruvespera akcepto ĉe la urbestro la IFEF-prezidanto transdonis salutojn kaj donacon de la urbo Bamberg. La partoprenintoj en la 18a Jarkunveno de GEFA memoras pri la historiaj rilatoj inter Villach kaj Bamberg. Tiel abunde urbestro Resch regaligis siajn gastojn, ke la kelnerojn dum la vespera Internacia Balo ne ŝarĝis pezaj monuoj. Kvarteto Esperanto eltenis kun la dancemuloj ĝis la 2.30 h. matene.

Mardon, la 13an

La terminara komisiono dikutigis demandojn koncerne la tradukadon laŭ UIC-leksikono kaj procedajn aferojn ne novajn, sed ankaŭ ne jam kontentige solvitajn. Tiu ĉi komisiono sendube okupas ŝlosilpozicion en la faklingva laboro. Fakprelegoj ĉiun jaron prezentas novajn problemojn, kiujn la lingva komisiono devus noti kaj trakti. Oni havas la impreson, ke la terminara komisiono moviĝas en fermita cirklo aŭ senelirejo. Multe da laboro farita devus urĝe baldaŭ vidigi praktike utiligeblajn rezultojn.

Dume la junaj IFEF-anoj pritraktis eblojn de pliaktivigo kaj aliajn ne specife junularajn problemojn.

Dipl. inĝ. Friedrich Tschom, kiel fakulo pri tiu afero verkis kaj mem prezentis antaŭ ĉ. 180 aŭskultantoj aktualan temon el la kongreslando. La aŭtomobiltransportado sur la Tauern-linio ŝajnas esti unu el la malmultaj profitdonaj branĉoj de ÖBB. Modernigo de la trakaro, novaj vojlinioj, viaduktoj, adekvataj ŝarĝebloj konsiderinde rapidigis kaj raciigis la trafikon sur fervojo kaj ŝtrato inter Salzburg kaj Karintio. La oferto de la fervojo ebligas hodiaŭ grandkapacitan rulantajn ŝoseon tra la Tauern-tunelo kun atentinda ŝparo je mono kaj tempo. Arkivbildoj, ekspozicio kaj diskutaj demandoj kompletigis la scion pri la prelegotemo. Tekstbroŝuroj en vere reprezenta eldono estis disponigataj al la aŭskultintoj.

60 000 poŝtaĵoj estis filatele ŝtampitaj,

kiam je la 13a horo ĉesis deĵori la oficistoj de la kongresa poŝtejo. Ilian specialan giĉeton okupis antaŭe la kongresa monŝanĝejo de Sparda Villach.

La vesperaj filmprezentoj raportis pri la pasintaj skisemajnoj kaj pri la IFEF-kongreso en Tarragona, vidigis belaĵojn el Villach kaj ĉirkaŭo, kaj invitis al Skandinavio.

En du duhoraj kunsidoj lundon kaj mardon kolego Robiollé, prezidanto de FFEA, povis arigi entute ĉ. 20 interesulojn kaj kunlaborantojn. Oni raportis kaj diskutis pri diversaj, ĉefe konservativaj varbmetodoj kaj aŭdis pri modernstila informado, kiun apliki por niaj celoj malebligas simple nia financa bazo. Konkludiĝas, ke ekonomie ni apliku niajn fortojn kaj monrimedojn por bone celita informado kaj individua varbado. Plej bonan sukceson evidente atingis FFEA per vaste, malmultekosta diskonigo kaj kvazaŭ personaj leteroj al ĉiu interesito; rezulto: ĉ. 10 novaj asociaj membroj monate.

Merkredon, la 14an

La publika laborkunsido, malgraŭ la nekutime frua komenco, havis multajn gastejojn, kiuj kundiskutis pri la agadraportoj, buĝeto kaj kongresproponoj. Skellefteå estis unuanime ekceptata kiel venontjara kongresloko. La fervojista tago en la Universala Kongreso okazos la 29an de Julio en Kopenhago.

La ekstratrazno al Arnoldstein ekveturis akurate je la 13.02 h. En duonhora marŝado la kongresula serpento sin movis monten al la valstacio de la tri-land-angula telfereto. Certe pli ol ducent duoblaj seĝoj svebigis la tutan trajnplenon super arboj kaj rokaj kaskadoj al la montopinto. La ĉielo ŝetis hajlon kaj sunradiojn sur gajajn homojn, kiuj rulis neĝbulojn kaj rikoltis krokusojn inter degelanta glacio.

Plej kuraĝaj nordeŭropanoj, spite la averton de aŭstria limgardisto, eĉ metis unu piedon sur jugoslavian terenon, aŭ du piedojn, kio al la limland-gazetaro liveris emocije ŝargitan skandalrakonton: „Kruza atenco al ano de la Esperanto-Kongreso en Villach“. Domaĝe, ke ili pretervidis, pro kio jugoslavaj soldatoj arestis la norvegan kolegon: lingva dilemo. Tiuj jugoslavo parolis nek slovenan, nek aŭstrian, nek norvegan, nek esperantan lingvojn. Ili ankaŭ forgesis raportiri, ke pro interveno de jugoslava kongresanino la afero en mallonga tempo estis

klarigita kaj la kaptito libera.

Nu, **tiaj** gazetoj estas ne nur en Aŭstrio aŭ Germanio. Cetere, dank' al bona preparado fare de la kongresa gazetara servo, nia manifestacio trovis pozitivan eĥon ne nur en la loka, regiona kaj landa gazetaro, kiu en multaj, ofte plurkolumnaj artikoloj informis siajn kutimajn legantojn pri signifo de la lingvo kaj laboroj de la kongreso, kaj la kongresanojn en Esperanto pri gravaj eventoj el la mondo. Ankaŭ televida kaj radiofona programoj dissendis kelkaj raportojn kaj intervjuojn.

Nur el la lokaj gazetoj de Arnoldstein ni eksciis ankaŭ pri, kion programo kaj kongreslibro honteme kaŝis, horo de la planita inaŭguro de Esperantostrato en tiu ĉi urbeto. Al nia kolego Stuppning, Arnoldstein-ano, ni dankas tiun ĉi iniciaton.

De nia malkara loko, fervoja vardeponejo, ni kun intereso observas la edifajn gestojn de diversaj gravmienaj personoj. Fine flago falas de la muro, folkloro muziko vikle trumpetas, kostumitaj knabinoj vendas brandon el bareleto, super la kapoj ŝvebas arbetokrono, ŝanceliĝas dum longaj momentoj.

Poste ni legis en la kongresa Bulteno: „... la prezidantoj de IFEF kaj LKK kaj la landaj delegitoj komune plantis aceron.“

La Forumo, relative nova afero, kiu originas el kongrespropono, pli kaj pli trovas amikojn kaj embarasigajn demandantojn. En Villach merkredon vespere LKK sin montris bone informita. Ĉirkaŭ 90 personoj ĉeestis; 45 demandojn koncerntajn la gastejlandon respondis la kongresa komitaturo.

Ĵaŭdon, la 15an

Plenkunsido, akcepto de la estraraj raportoj, reelektado de la komisionaj funkciuloj, voĉdonado pri la kongresproponoj, fondiĝo de nova komisiono „informado — varbado“; leteraj, kurieraj, telegrafaj salutoj de i. a. prezidento d-ro Kirchschräger, kanceliero d-ro Kreisky, trafikministro Lanc, UN-sekretario d-ro Waldheim.

Kvankam la posttagmeza ekskurso estis rezervita aparte por virinoj, tamen kelkaj aventure kostumitaj virkongresanoj pli — malpli sukcesis enŝteliĝi en la aŭtobusojn disponigitajn de la urbo; tamen la virina elemento laŭdire tiel aŭdeble dominis, ke la belegan pejzaĝon oni apenaŭ kvaronokule perceptis.

Futbalfan (-atikul-) oj kaj aliaj homoj el

urbo kaj kongreso partoprenis, almenaŭ pasive, sed ne malpli fervore, la piedpilko-maĉon de Sparda-Villach kontraŭ IFEF-Esperanto. Ĉu la kontraŭula teamo estis pli malbona, ĉu la nia pli bona: ĉi-jaron ni malgajnis nur kun 6 je 3 goloj. Sparda Villach, la fervojista banko, pri tiu ĉi interamika ludo presis kaj distribuis en la tuta urbo plurkoloran afiŝon. Ankaŭ la kongresa dokumentujo estis diponigita de Sparda.

Miselekto, evidente ne misa, okazis en la kadro de la vespera junularprogramo (por la neangloj: Miss = fraŭlino). Lifkaŭ havis sian ĉi-jaran ĉefgesidon. Pluraj gestrigoj eltrovis obskuran noktastejon kun negrinoj kaj aliaj bonfaremulinoj.

Vendredon, la 16an

Tiel facile, rapide, preterfluge pasis la lasta kongrestago: mallonga trajnvojaĝo, agrabla promenado al la lago de Wörth, ŝipveturado sub brila foto-ĉielo, marŝeto al Minimundus, vera minimondo, kie la urbestro de Klagenfurt, s-ro Guggenberger, bonvenigis la kongresanojn.

En la foirhalo, kiun erarvage oni fine trovis, la tagmanĝaj tabloj estis jam preparitaj. Kvarteto Esperanto lastan fojon okupis la scenejon por akompani muĝon ĉetablan kaj tintadon de glasoj per ritmaj sonoj. Prezidanto Gießner resumis la rezultojn de la laboro kaj kun meritita danko al la organizintoj fermis la kongreson. Amika manpremo inter Walter Huber kaj Ingve Forslund kaj transdono de la IFEF-flago al la 28a kongreso finis la lastan solenan akton.

Vino bona — ĉio bona (por varii germanan proverbon)! En Svedio alkoholaĵoj estas multekostaj. Sed Skeleffteå havas senĥloran fontoakvon kaj senĉesan tagon dum 1a kongressemajno de la 12a ĝis la 18a de Junio 1976.

wbr.

Der Presse wurde folgende Kongreß-Resolution übergeben:

Der 27. Internationale Eisenbahner-Esperanto-Kongreß in Villach (Österreich) mit 675 Teilnehmern aus 20 Ländern

- stellt fest, daß ungeachtet unbestreitbarer Schwierigkeiten allgemein und dauernd in internationalen Konferenzen die bisherigen konservativen Methoden sprachlicher Verständigung bei mündlichem Dolmetschen bzw. bei Übersetzung schriftlichen Materials angewendet werden,
- weist darauf hin, daß auch die Eisenbahnverwaltungen, Eisenbahner-

Gewerkschaften und andere Eisenbahn-Organisationen das gleiche Verfahren anwenden, wodurch unzählige Arbeitsstunden verloren gehen und sich die Kosten beträchtlich erhöhen,

- unterstreicht, daß der Gebrauch nur weniger „Arbeits Sprachen“ außerdem die sprachliche Unterdrückung derjenigen bedeutet, die solche Sprachen nicht als Muttersprache beherrschen, was gleichzeitig stärkste Nachteile für die vertretenen Eisenbahnen oder Organisationen bedeutet,
- ist der Auffassung, daß die Eisenbahn-Verwaltungen, Gewerkschaften und andere Organisationen großes Interesse daran haben müßten, derartige sprachliche Ungerechtigkeiten schnellstens zu beseitigen,
- empfiehlt deshalb, mit Hilfe einer brauchbaren, lange Zeit praktisch erprobten neutralen Sprache auf internationaler Ebene die Bedingungen für direkte, gleichberechtigte, unkomplizierte sprachliche Kontakte zu schaffen,
- schlägt vor, hierfür die internationale Sprache Esperanto zu wählen, die alle Bedingungen erfüllt,
- erklärt, daß der Internationale Eisenbahner-Esperanto-Verband bereit ist, am Erreichen dieses Zieles mitzuarbeiten.

Kopenhago vokas

Ni atentigas niajn membrojn, ke la 60a Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉi-jare en Danlando de la 26a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto. Same kiel en Hamburgo, nun niaj danaj kolegoj esperas starigi fervojan informojn en la kongresejo. Inter la multaj fakaj kunvenoj okazontaj dum kaj lige al la Universala Kongreso de Esperanto, ankaŭ ĉijare, nome mardo la 29an de Julio, okazos FERVOJISTA TAGO kun proksimume jena programo: Kolektiĝo en la kongresejo je la 9.30 horo. Ekveturo al varterminalo de Kopenhago (Bernstoffsgade 50). Prelego kun filmo kaj diapozitivaj pri „vartransporto per la Danaj Ŝtatformoj (DSB), precipe pecajtransporto — antaŭe, nun kaj estonte —“. Lunĉo, Vizito al moderna varterminalo. Fino proksimume je la 16 horo. Nombro de partoprenontoj estas limigita je 50 personoj. Tial estas rekomendinde antaŭe mendi biletojn ĉe: Henning Haüge, Eranthisvej 16, Dk-9800 Hjørring. La bileto inkluzive lunĉon kostas 25 d.kr. (proks. 12 GM).

El la grupoj

Frankfurt. La 23an de Aprilo s-ro d-ro Lang, la komisiito por Esperanto en la fervoja distrikto Frankfurt, adiaŭis en tiu ofico okaze de kutima kunveno. Por la Sociala Organizo de la distrikto Frankfurt s-ro Stadler esprimis la dankon kaj transdonis florbukedon kun aparta donaco. Nomo de Germana Esperanta Fervojista Asocio la sekretariino s-ino Kruse akcentis la valoron kaj gravecon de pli ol 20-jara laboro por GEFA. S-ro Kiefer, la posteulo en tiu honorofico, trafe laŭdis liajn meritojn kaj transdonis kiel dankesprimon librodonacon, vinon kaj florojn. D-ro Lang emocie promesis pluan kunlaboron kaj subtenon laŭ siaj ebloj ankaŭ kiel baldaŭa pensiulo. La ĉeestintoj multe aplaŭdis la ceremonion.

S-ro Mager, membro de la grupo Frankfurt, povis akiri novan sukceson kiel filatelisto. Okaze de filatela ekspozicio en Madrid (4. — 13. 4. 1975), aranĝita de la Internacia Federacio de Filatelistoj (FIP), la eksponaĵoj de s-ro Mager ricevis arĝentobroncan medalon. Tiu honorigo estas donita pro 60 folioj kun poŝtmarkoj, karto, leteroj kaj ŝtampoj, kiuj ĉiuj rilatas Esperanton. Ni kore gratulas.

Essen.

Unser Mitglied Josef Ballo, Mülheim/Ruhr, nahm am 67. nationalen französischen Esperanto-Kongreß in der mit seiner Heimatstadt freundschaftlich verbundenen Partnerstadt Tours teil (s. auch Bulteno 2/75). Die Regional-Zeitung „La Nouvelle Republique“ berichtete ausführlich über die Veranstaltung und überschreibt den bebilderten Text mit „Esperanto, das Latein des 20. Jahrhunderts“. Im Mittelpunkt der Veranstaltung, an der laut Teilnehmerliste 186 Esperantisten, darunter 2 aus der Bundesrepublik Deutschland, teilgenommen haben, stand die Einweihung einer Straße „Dr. Zamenhof, Schöpfer des Esperanto, 1859 — 1917“. GEFA gratuliert der französischen Esperanto-Bewegung zu diesem sichtbaren Erfolg.

Münster (Vestfalia) / Osnabrück

Dum kelkaj jaroj jam la 1a de Majo estas por la Esperantistoj de Münster (Vestfalia) kaj Osnabrück tago de migrado. En ĉi-tiu jaro ni migris kun gastoj el Paderborn kaj Hagen (Vestfalia) tra la bela montara ĉirkaŭaĵo de Osnabrück. Ni renkontiĝis ĉe la ĉefstacidomo en Osnabrück. Preterpasante la zoologian ĝardenon ni

grimpis sur la „Schölerberg“. Dum kelka tempo akompanis nin hundeto perdinta sian sinjoron, gafja afero por la junuloj inter ni. Ni paŭzis en la restoracio „Waldesruh“. Post daŭrigo de la migrado preter printempaj floroj ĉe la vojojandoj kaj bovoj sur verdaj herbejoj ni atingis parte babilante parte kantante la restoracion „Rahenkamp“, kie ni tagmanĝis. Posttagmeze ni denove migris. Pro sufiĉe lacaj gamboj ni ĝojis, kiam ni alvenis finfine ĉe la aŭtobusa haltejo. Kontentaj kaj dankemaj pri la bela tago, ni gaje veturis hejmen. Entute ni estis pli ol 30 personoj.

J. Schr.

Bremen

Ankaŭ tie la fervojista grupo faris kune kun la urba grupo okaze de la internacia festotago promenadon tra la urba parko sub la devizo „la Majo alvenis“. Survoje oni okupis sin pri botanikaj nomoj, kaj ankaŭ distraj kaj sportaj eventoj ne mankis. La celo estis la arbara kasteleto kun ĉarma restoracio, en kiu la partoprenintoj komune trinkis kafon. La suno brilis nekutime gaje super la plezuriga evento. Por Junio planis la vigla grupo biciklan ekskurson.

Jahreshauptversammlung 1975

Die 19. Jahreshauptversammlung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk findet vom 10. bis 12. Oktober 1975 in Treuchtlingen statt (s. Bulteno 2/1975, Seite 3). Um die rechtzeitige Anmeldung zu gewährleisten, werden das vorläufige Programm und der Anmeldevordruck — bitte abtrennen — auf den letzten Seiten dieser Ausgabe veröffentlicht. In einem besonderen Beitrag wird die gastgebende Stadt im Bulteno 4/75 vorgestellt. Reservieren Sie sich dieses Wochenende und melden Sie sich rechtzeitig an.

Arhus-prospekto

La riĉe ilustritan koloran prospekton vi jam konas deponit la IFEF-kongreso 1973. La bonaj recenzoj kaj mencioj en la gazetaro kaj radio vekls grandan intereson. Petoj pri la broŝuro venis kaj venas el la tuta mondo. Intertempe la 4a reviziita eldono nun atendas la saman intereson. Ĝi estas mendebla ĉe: Turistforeningen, Radhuset, Dk 8000 Arhus C. Petu denove la belan kajeron.

Redaktfino por n-ro 4/75 estas la 15.8.75

NEKROLOGOJ

La 13an de Februaro 1975 mortis en sia 82a vivojaro nia ŝatata samideano **Wilhelm Becker**.

Wilhelm Becker naskiĝis la 22an de Novembro 1893 en Neuhaus apud Paderborn. Jam en la jaro 1923 li eklernis Esperanton en la tiama popolaltlernejo Kassel. Proksimume ekde 1928 li estis membro de neutrala grupo Kassel. En tiu tempo li ankaŭ fariĝis SAT-ano. Sinjoro Becker estis kunfondinto de Fervojista Esperantogrupo Kassel tuj post la lasta mondmilito. Al ni pli junaj samideanoj li multe helpis per sia sperto kaj favoro. Ofte li bedaŭris, ke la disvastiĝo de Esperanto nur tre malrapide efektiviĝas. En sia vivo sinjoro Becker partoprenis multajn kongresojn de UEA, SAT kaj IFEF. Ni scias, ke li en la vasta mondo havis multajn amikojn, kiuj nur nun sciigas pri lia foriro.

Kun la familianoj la Fervojista Esperantogrupo Kassel funebras pri la morto de samideano Becker kaj dankas al li pro ĉio, kion li donis al ni.

Li ripozu en paco!

GEFA

Wilhelm Bulla

mortis en Recklinghausen la 16an de Aprilo 1975.

La 1an de Oktobro 1974 nia longjara fidela membro sufiĉe bonfarte festis sian naŭdekan naskiĝtagon. Ĝis pasintjare li partoprenis preskaŭ regule la regionajn kunvenojn, ĉiam gaja, kontenta kaj akurata. Ĝis antaŭ 4 jaroj li ankoraŭ kuraĝis vojaĝi al la IFEF-kongreso.

Jam 63jaraĝa, nur du jarojn antaŭ sia emeritiĝo, li eklernis la internacian lingvon Esperanto, kiu ebligis al li viziti la tiom ŝatatajn kongresojn, jarkunvenojn kaj regionajn renkontiĝojn. Ankaŭ en lia hejmo ĝi ebligis al li multajn internaciajn kontaktojn.

Lian biografion ni jam prezentis en Bulteno 1/73 kaj 5/74. Per la morto de nia amiko Bulla GEFA perdis fidelan kaj sinceran membron. Ni ne forgesos lin.

GEFA-estraro

Niaj Najbaroj

BEFA, la belga sekcio de IFEF, jam dum pluraj jaroj organizas sukcesajn korespondajn kursojn de Esperanto. De tempo al tempo oni praktikas ankaŭ la organizon de regulaj unutagaj seminarioj, dum kiuj la partoprenantoj de la korespondaj kursoj povas ricevi buŝajn instrukciojn kaj klarigojn. La lasta el tiaj aranĝoj okazis la 23an de Novembro 1974 en Bruselo sub la gvido de niaj kolegoj De Sutter, De Bruine kaj Van Humbeek.

Jarkunveno

BEFA kaj FERN komune en Maastrich/Nederlando la 13an ĝis 14an de Septembro 1975 kaj FFEA en Eperney la 20an ĝis 21an de Septembro 1975. Niaj najbaroj invitas vin tre kore por partopreni.

Informo de GEFA-kasisto

IFEF-insignoj po 3 GM estas haveblaj. Mendu ĉe: BS Bernhard, Bf Frankenthal (954/8524/25). Ankaŭ glumarkfoliojn okaze de la 28a IFEF-kongreso en Skellftea/Svedujo, po folio 0,75 GM, vi povas mendi.

Lingva Angulo N-ro 1

Nia lingva angulo instigu al iom pli intensa okupo pri la Internacia Lingvo. Estos laŭvice traktata: el la Regularo Esperanto, interesaj gramatikaj temoj kaj proverboj aŭ frazoj por montri la esprimeblecojn de Esperanto. Ni komencu per la **16 Reguloj**. Ili estas la fundamento de Esperanto. Jen la unuaj du:

① **Artikolo** nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (la), egale por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

② La **substantivoj** havas la finiĝon „o“. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon „j“. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo „n“. La ceteraj kazoj estas espremataj helpe de prepozicioj (la genitivo per „de“, la dativo per „al“, la ablativo per „per“ aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).

Pri tabelvortoj (korelativoj)

Enmetu la korelativajn parojn.

Elektu inter kie — tie; kiel — tiel;

kia — tia; kiam — tiam; kiom — tiom.

..... la patro, la filo. Ĉu ne

estas, mi diris al vi? (Z)

..... estas mielo, muŝoj ne

mankas. (Z)

..... da kapoj, da gustoj. (Z)

La artikolo estas uzata, mi

parolas pri personoj aŭ objektoj. (Z)

Ne hezitu konsulti viajn vortaron kaj lernolibron!

(Z) = verkita de Zamenhof

El Proverbaro Esperanta

„Sen mono oni estas nulo, kum mono saĝulo.“

„Kiam neĝas sur la monto, estas malvarme en la valo.“

Hartig

Germanlingva teksto de la ĉi-jara takprelego estas ricevebla por du respondkuponoj de dipl. inĝ. F. Tschom, Susi-Wallner-Str. 14, A-4020 Linz (Donau). La germana resumo aperos en la venonta numero de Bulteno.

La pasaĝertrafiko kun Sovetunio

Vizitantoj al Sovetunio scias, ke tie la ŝpuro t.e. la distanco inter la reloĵ estas iom pli larĝa ol en la cetera Eŭropo, escepte de Hispanio kaj Portugalio. Krom tiu teknika diferenco ekzistas en Sovetunio kaj en la cetera socialista hemisfero alia transportjuro kun koncernaj sekvoj en la tarifoj por la pasaĝertrafiko.

La kreskanta turismo sciis superi tiujn obstaklojn. La sovetaj teknikistoj konstruis litvagonojn uzeblajn sur ambaŭ trako-sistemoj. La komercaj servoj de la eŭropaj fervojoj kreis specialan tarifon. Nuntempe cirkulas direktaj litvagonoj inter Belgio, Francio, Nederlando, Svislando kaj Moskvo resp. Leningrado tra la reto de la Germana Federacia Fervojo. La litvagonoj apartenas al la Sovetaj Fervojoj (SZD), kiuj disponigas ankaŭ la litvagonan personaron. La enspezoj el la litvagonaj biletoj apartenas al la SZD, kiuj siaflanke devas kompensi la koncernajn fervojojn surbaze de la akskilometroj. La enspezoj el la internaciaj veturbiletoj estas atribuatataj laŭ la tarifoj al la koncernaj fervojoj.

Havigi biletojn por vojaĝo kaj litvagono ne estas problemo en okcidentaj landoj. Oni aĉetas ilin ĉe difinitaj biletdonejoj aŭ vojaĝagentejoj. Pli malfacile estas

ricevi vison de Sovetunio resp. de la transirlandoj. La speciala tarifo ebligas vojaĝojn nur al Moskva kaj Leningrado kaj al la survoje situantaj haltstacioj. Por celstacioj ekster la menciitaj linioj necesas en Sovetunio apartaj biletoj, kiuj estas haveblaj nur pere de difinitaj vojaĝagentejoj. Vojaĝi ekskluzive sur la transsiberia fervojlinio ne estas eble por okcidentaj pasaĝeroj. Kie la fervojlinio kondukas tra fermitaj zonoj, la okcidentaj pasaĝeroj devas uzi la aviadilon. Cetere la preznivelo inter aviadilo kaj fervojo ne multe diferencigas.

Pro la fakto, ke ekzistas apartaj preskriboj por okcidentaj turistoj, necesas informi sin sufiĉe frue kaj bone. El vidpunkto fervojista estas kontentige scii, ke inter okcidento kaj oriento ekzistas regulaj interligoj per sufiĉe bone frekventitaj litvagonoj.

W. B.

Anschriftenänderungen

Bei den mit Bulteno 1/75, Seite 6, bekanntgegebenen Anschriften ändern sich:

Kasisto: BS Bernhnard, Bf Frankenthal; Basa 954/8524/25, Stuttgart: **TBO** Amtm Krüger, Bw Heilbronn; Basa 952/862/328.

Um Einbesserung wird gebeten (geändert haben sich die im Fettdruck wiedergegebenen Angaben).

Turismo kaj humoro

Mielmonato

— Post la geedziĝo ni aŭtomobile forvojaĝis.

— Kie vi pasigis la mielmonaton?

— En la hospitalo . . .

Libertempo

Ferianta junulio demandas amikino:

— Kia estis la akvo hodiaŭ ĉe la banstrando?

— Admirinda! Tute plena de viroj.

Aĥ, tiuj prezoj!

Hotelestro: — Sinjoro, belega sunsubiro estas videbla. Ĉu vi ne deziras ĝin rigardi?

Turisto: — Kiom kostas?

Miopulo

Vojaĝanto rigardas tra fenestro de aviadilo:

— Kiel malgrandaj estas la homoj, similas al formikoj.

— Sed tiuj ja estas formikoj, sinjoro!

Ni ankoraŭ ne forflugis . . .

**19. Jahresversammlung
der deutschen Eisenbahner-Esperantisten
im BSW vom 10. bis 12. Oktober 1975
in Treuchtlingen**

Wie bereits mit Bulteno 2/75 angekündigt, findet unsere diesjährige Jahresversammlung vom 10. bis 12. Oktober in Treuchtlingen (BD München) statt. Versammlungslokal ist die Gaststätte „Stadthalle“, etwa 10 Minuten vom Bahnhof entfernt.

Vorläufiges Programm

Freitag, den 10. 10.

Presseempfang und Eröffnung der Ausstellung „Straßen der Welt“. Informationsabend für die Bewohner der Stadt. Vorstandsbesprechung und zwangloses Beisammensein.

Samstag, den 11. 10.

- 9.00 Arbeitssitzung. Sprachprüfung. Rundgang durch die Stadt.
- 12.00 Gemeinsames Mittagessen.
- 14.00 Busfahrt durch das Altmühltal mit Besuch des Solnhofener Pretrefaktenmuseums (Versteinerungen und Ausgrabungen).
- 18.00 Gemeinsames Abendessen.
- 19.30 Begrüßungsabend, anschl. Tanz.

Sonntag, den 12. 10.

- 9.30 Sprachprüfung. Matinee. Jahresbericht des GEFA-Vorsitzenden.
- 12.00 Gemeinsames Mittagessen.

Das endgültige Programm erhalten Sie bei Ihrer Ankunft in Treuchtlingen. Auf dieser und der letzten Seite finden Sie den Anmeldevordruck (Aliĝilo), um dessen sorgfältige Ausfüllung — Vorder- und Rückseite — gebeten wird.

Um Rücksendung Ihrer Anmeldung und Bestellung der Unterkunft wird **bis zum 20. September** gebeten. Dienstschrift: Josef Weidacher, Bw München-Ost (Basa 962/834/553 oder 566); — Privatschrift: 8 München 82, Schneefinkenweg 11. Vor Ihrer Anreise werden Sie eine Zimmer-Reservierungsbestätigung vom Fremdenverkehrsverein Treuchtlingen erhalten.

Aliĝo por la jarkunveno en Treuchtlingen
GEFA-anoj aliĝu, kiel anoncite en germana lingvo sur paĝo 6. Gastoj el Germanio kaj eksterlando petu aliĝilon de „Germana Esperanta Fervojojista Asocio — sekretariejo —, D-6 Frankfurt/Main, Karlstraße 4-6 aŭ rekte de la LKK, s-ro Josef Weidacher, 8 München 82, Schneefinkenweg 11.

bonvolu tranĉi

ALIĜILO

Mi aliĝas al la

19a jarkunveno de la germanaj fervojistoj esperantistaj en Treuchtlingen

s-ro / s-ino / f-ino *)

(bonvolu skribi preslitere aŭ per maŝino)

familia nomo: antaŭnomo: aĝo

deĵorejo kaj distrikto: deĵora titolo

privata adreso: (urbo kaj strato)

Mi venos kun familiano (edzino, infano k. c.)
laŭ aparta aliĝilo

Supozebla alveno (tago/horo): /

Mi deziras loĝi kune kun s-ro / s-ino / f-ino *)

rezervita por notoj de LKK

*) bv. for streki netrafan

n-ro	loĝigo	zorgita	informita	manĝoj	ekskurso	kotizo	paperoj

**Germana Esperanta Fervojista Asocio
(GEFA)**

**Vereinigung deutscher Eisenbahner-
Esperantisten im BSW**

Ni invitas niajn membrojn kaj geamikojn
al la 19a jarkunveno de GEFA en **Treucht-
lingen** (Bavarujo)

10a ĝis 12a de Oktobro 1975

PROVIZORA PROGRAMO

Vendredon, la 10an

Gazetara konferenco. Malfermo de
Esperanto-ekspozicio. Informa vespero,
estrarkunveno kaj babila rondo sen
programo.

Sabaton, la 11an

9.00 Estrarkunveno. Lingva ekza-
meno. Rondirado tra la urbo.
12.00 Komuna tagmanĝo.
14.00 Aŭtobusekskurso.
18.00 Komuna vespermanĝo.
19.30 Salutvespero kaj danco.

Dimanĉon, la 12an

9.30 Lingva ekzameno. Matineo.
12.00 Komuna tagmanĝo.

Allĝilon bonvolu sendi ĝis la **20a de Sep-
tembro** al s-ro Josef Weidacher; deĵora
adreso: Bw München-Ost, privatan adreso:
D-8 München 82, Schneefinkenweg 11.

Akceptejo troviĝas en la stacidomo; mal-
ferma: vendredon 16.00 – 22.00, sabaton
8.00 – 19.00. **Kunveno** en la urba „Stadt-
halle“ (10 minutojn piede de la staci-
domo). **Loĝado**: Post la mendo vi ricevos
konfirmon flanke de la trafikoficejo.

Ekzameno: Partoprenantoj anoncu sin al
s-ro Fritz Lautenbach, D-64 Fulda,
Am Abtstor 21; deĵora adreso: BAmM
Lautenbach, BA Fulda, telef. 957/822/243.

Mi mendas unulitan ĉambron, dulitan ĉambron por la noktoj

Ich bestelle Einbettzimmer Zweibettzimmer für die Nächte

10./11. – 11./12. – 12./13. Oktober 1975

en grupoj I = gastejaj ĉambroj 15–18 GM po lito/ je Bett *) Gasthauszimmer
en grupoj II = hotelĉambroj 19–21 GM po lito / je Bett *) Hotelzimmer
privataj ĉambroj 10–13 GM po lito / je Bett *) Privatzimmer
ĉiuj inkl. de matenmanĝo, impostoj kaj servmono.

Mi partoprenos la aŭtobus-ekskurson jes / ne *)

Ich nehme am Omnibusausflug teil ja / nein *)

Mi partoprenos al la komunaj manĝoj kaj pagos post mia alveno por unu tagmanĝo
6 GM kaj vespermanĝo 4–5 GM:

Sabaton tagmeze jes / ne *)

Sabaton vespere jes / ne *)

Dimanĉon tagmeze jes / ne *)

*) bv. forstreki la nedeziritan.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung /
redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Druckerei Friedrichs,
342 Herzberg am Harz. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperan-
tisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.